N-ro 2 - 2017

Martinus Institut

# Kosmos

## La Kosmologio de Martinus

**Martinus:**
Vera kristanismo

**Ole Therkelsen:**
La kristana moralo

**Martinus:**
Naciismo kaj internaciismo

**Ole Therkelsen:**
Pri la titolo “La Tria Testamento”

**Martinus respondas:**
Mondliberiganto




Esperanto

# KOMENTO

Kara leganto!

Grava anonco: La kristanismo mortas, vivu la kristanismo!

Aŭ pli ĝuste: La preĝeja kristanismo iom post iom malgrandiĝas kaj ekvivos nova tipo de kristanismo kiu havos la spiritan sciencon de Martinus kiel sian bazon – tute sen kredo, dogmoj kaj ceremonioj. Grandega kaj tre interesa transformado de la kristanismo, ĉu ne? Pri tio temas tiu ĉi numero.

La kristanismo havis enorme gravan rolon en la historio de la okcidentaj popoloj dum la du lastaj jarmiloj. Ankaŭ nuntempe ĝi multe influas la vivon de multegaj homoj – hodiaŭ ekzistas laŭtakse pli ol 2 miliardoj da kristanoj en la tuta mondo, ĉefe en Ameriko kaj en Eŭropo. Tamen en pli kaj pli da landoj la plej multaj preĝejoj estas pli kaj pli malplenaj. Multaj homoj ne plu sentas bezonon iri al preĝejo regule, ne kredas je Dio kaj ne volas esti ano de iu religio. Laŭ la analizoj de Martinus tio estas tute natura evoluo kiu daŭrigos dum la venontaj jardekoj kaj jarcentoj. Sekve en la estonteco granda plejmulto de la homaro ne konsideros sin ano de iu religio. Ĉu tio signifas ke la kristanismo mortos? Laŭ Martinus tute ne, sed la nuna preĝeja kristanismo jes iom post iom velkos kaj en tre longa perspektivo (pluraj jarcentoj) formortos.

Kia kristanismo do ekzistos se la nuna preĝeja pli kaj pli malfortiĝos? Tiam ekregos, laŭ Martinus, "vera" aŭ "pura" kristanismo. Por ĝi ne necesas iaj ajn ceremonioj aŭ specialaj ornamaĵoj aŭ eĉ *kredo*. Ĉio tiam temos pri la konduko al la ĉirkaŭaĵo kaj al la proksimulo – senkondiĉa amo estos la sola vere grava afero. Pri tiu ĉi temo vi povas legi en la artikolo "Vera kristanismo" de Martinus.

La tekstoj de Ole Therkelsen en tiu ĉi numero de Esperanto-Kosmos temas pri kiel la ĉefa titolo de la verkaro de Martinus "Tria Testamento" iom post iom "aperis" kaj kion signifas havi kristanan moralon. Krome pri la nocio "mondliberiganto" venos informoj en respondo de Martinus.

Verŝajne kaj Jesuo kaj Martinus estis tiel nomataj "mondliberigantoj" de la homaro, sed kun malsamaj misioj. Jesuo havis la taskon montri kiel preta kaj ĉioama homo vivas, do esti *modelo* por ĉiuj pacosopirantaj terhomoj. Jesuo ja ankaŭ estis fonto de sentobazita religio, la preĝeja kristanismo, kiu estis adaptita kaj sekve tre taŭga por homamasegoj dum la lastaj du jarmiloj. Nun pli kaj pli da homoj volas havi klarigojn kaj komprenon pri la vivo kaj kiel mem agi por havi harmonion, bonfarton kaj pacon en sia ĉiutago. Ĝuste tiujn informojn Martinus provizas per siaj profundaj kaj abundaj analizoj pri multaj aferoj kaj krome li ankaŭ klarigas plurajn el la eldiroj kaj simbolaj rakontoj de Jesuo. Sed Martinus ne estu fonto de nova religio! Liaj libroj, artikoloj, simboloj kaj prelegoj estu fonto de spirita scienco kiu montras kial indegas "alturni la alian flankon", "remeti sian glavon", "pardoni ne 7 fojojn tage sed 7 oble 70 fojojn" kaj "ami sian proksimulon kiel sin mem".


Ni tre esperas ke la temo kaj la enhavo de tiu ĉi numero plaĉas al vi.

*Hokan kaj Ole*

# Vera kristanismo

de Martinus

M1178



**1. Rivelo de la dia estmaniero**

Kion oni celas per "kristanismo"? – La kristanismo estas rivelo de la vero manifestita per la vortoj kaj agoj de la mondliberiganto Jesuo Kristo.

Kiam tiuj ĉi vortoj kaj agoj estas esprimataj kiel rivelo de vero, estas pro tio ke ili montras tiun, en la dia mondoplano esprimitan estmanieron, kiu sole nur povas gvidi la homon al la plej alta formo de vivtravivado, kio signifas: staton de vivtravivado en kiu absolute ne ekzistas ia ajn suferado. En tiu ĉi stato de vivtravivado sekve ne ekzistos ia ajn formo de milito, netoleremo, egoismo, posedemo, enviemo, ĵaluzo, kalumnio, panenvio fraŭdo, trompemo aŭ rabado, same kiel ankaŭ ne ekzistos ia ajn formo de malsano, korpaj aŭ psikaj vundoj. Nur povos ekzisti la plej alta vivĝojo, nome vivi en plena aŭ cent-elcenta amokontakto kun homoj kaj aliaj vivaj estuloj.

**2. La regno de Dio**

Cent-elcenta amokontakto kun aliaj estuloj, estas la samo kiel ami sian proksimulon kiel sin mem kaj sammaniere esti amata de li. Tio ĉi ja estas "la plenumo de la leĝo", kio signifas, ke ĝi estas la plenumo de la dia celo en la mondoplano, kio denove estas la samo kiel esti "la homo laŭ la bildo de Dio". Ne malfacilas kompreni, ke mondo kun tiaj estuloj nur povas esti la absoluta "regno de Dio".

Kompreneble ankaŭ ĉiuj aliaj vivaj estuloj ekzistas ene de la regiono de Dio, kvankam ili ankoraŭ ne atingis la antaŭe menciitan pretan stadion. Ili pro tio devas vivi en neperfekteco, kun ĝenoj kaj malfacilaĵoj, militoj kaj suferoj samgrade, kiel ili ne estas finevoluintaj kaj pro tio ne havas la proksimulan amon, kiu ekskluzive garantias la eblon travivi la regnon de Dio aŭ la vivsferon de la finevoluintaj estuloj.

**3. Mondliberigantoj estas evolue pli aĝaj fratoj**

Por ĉiuj individuoj de la tera homaro validas, ke ili ankoraŭ ne estas finevoluintaj homoj. Ili ankoraŭ ne povas memstare percepti aŭ kompreni la estmanieron de proksimula amo, kiu estas la senco kaj celo de la vivo. Pro tio ili devas de tempo al tempo ricevi helpon de la Providenco por havi klarigojn kaj esti gvidataj en la trakojn kaj vojojn de la ĝusta konduto. Tia helpo por la homaro estas la grandaj mondliberigantoj, kiuj ĉiuj estas estuloj, kiuj estas antaŭ la teraj homoj. Evolue ili do estas pli aĝaj fratoj por la teraj homoj, kaj la saĝo rivelita de ili estas ankoraŭ hodiaŭ, en formo de la grandaj mondreligioj, la gvida kaj portanta spirita forto por milionoj el la homoj de la tero. El ĉi tiuj religioj la kristanismo, kiu ricevis sian nomon de la origino, Jesuo Kristo, fariĝis la kuniga forto por la nacioj de la Okcidento.

**4. La proklamo de "la parakleto, la sankta spirito"**

Ke tiu ĉi proklamo, kiu riveliĝis pere de Kristo, ne fariĝos la lasta, sed ke la homoj ankoraŭ unu fojon estu helpataj de

la Providenco por atingi la finan celon, tiun de Dio deciditan “homo laŭ la bildo de Dio simila al li”, estis ja anoncita de Kristo mem, kiam li diris: “Mi havas ankoraŭ multon por diri al vi; sed nun vi ne povas ĝin elporti.” – “Sed la Parakleto, la Sankta Spirito, kiun la Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi.”

**5. Paganeco en la kristanismo**
Kristo sciis, ke la homoj ankoraŭ estis tiom nepretaj, ke ili provizore ne povus akcepti la absolute ĝustan komprenon pri la efektiva vero. Li klare sciis, ke kiam li estos for, multaj el la nepretaj naturoj en la homoj igos ilin miskompreni kaj interpreti lian puran instruon, tiel ke ĝi kongruos kun ilia pagana mensostato. Tiamaniere ĝi ja fariĝis malpli esprimo de kristanismo kaj en koresponda grado esprimo de paganeco aŭ la nepreta naturo de la estulo, alivorte la mortiga kaj militgvida naturo, do la de la bestoregno heredita naturo, kies principo estas: “ĉiu por si mem estas la plej kara”.

La pura kristonaturo estas ja la mala principo, “por ĉiu la proksimulo estas la plej kara”, kaj tiu ĉi principo absolute devas fariĝi la rega, se la homoj povu atingi aperi kiel “la homo laŭ la bildo de Dio simila al li” kaj tiel plenumi la diecan celon. Nur la plenumo de tiu ĉi principo povas konsistigi la veran kristanismon.

Ĉu ne estis ĝuste tiu ĉi principo, kiun la mondliberiganto gravuris en siajn disĉiplojn per la vortoj: “Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso.” kaj “Amu vian proksimilon kiel vin mem”? – Kaj ĉu ne estis ĝuste tio ĉi, kio estas la plenumo de la leĝo?

**6. La perfekta estmaniero elmontrita dum la krucumado**
Ke tiu ĉi perfekta konduto kaj vivostato estis praktikata de Kristo mem fariĝis, en neskuebla maniero, konfirmata sur la kruco, kiam li diras: “Patro, pardonu ilin, ĉar ili ne scias, kion ili faras.” Ĉu ekzistas pli granda amo ol povi pardoni siajn ekzekutistojn aŭ tiujn, kiuj mortige suferigas onin, kaj deziri al ili, ke ili ne suferu pro la krucumado aŭ kripligado, kiun ili kaŭzis al oni? – Ĉi tie ni vidas la absolute veran kristanismon kaj la solan vojon al la ĉielo, al la plenumiĝo de la dieca celo.

En tiu maniero Kristo sekve fariĝis la modelo, laŭ kiu la kristana homo ekskluzive povas kreiĝi. La homo, kiu ne povas akcepti “krucumon”, ne povas pardoni sian proksimulon, sendepende de kio ajn tiu ĉi faris al oni, startas senmove sur la vojo al la ĉielo, al la lumo, al la spertado de Dio. Tiu ĉi absoluta kristanismo fariĝis do praktikata cent-elcente de la mondliberiganto Kristo, kaj pro tio lia estmaniero kaj predikado ricevis la nomon “kristanismo”.

Eĉ se li havis nur tri jarojn por sia predikado kaj elmontrado de la perfekta konduto, la eterna vero kaj sekve la plej grandaj rezultoj de la vivo estis plantitaj en la spiritan atmosferon de la tero kaj en la karnon de certa nombro da homoj.

**7. La unuaj kristanoj iris laŭ la spuroj de Jesuo**
Ni vidas, kiel la unuaj kristanoj plene iris laŭ liaj spuroj. El liaj dek du apostoloj, dek unu ekzekutiĝis. Kelkaj eĉ fariĝis krucumitaj kun la kapo malsupren. Ĉu ne la historio ankaŭ montras, kiel la unuaj kristanoj ne deturnis sin por eviti esti ĵetitaj al sovaĝaj bestoj, prefere ol nei sian opinion, donitan de Kristo, pri la eterna vero kaj la de ĝi sekvanta estmaniero? Sen tiu ĉi migrado

laŭ la spuroj de Kristo, riske de la propra vivo, ne ekzistus hodiaŭ ia kristanismo. La mondo ŝuldas ne nur al Jesuo Kristo, sed altgrade ankaŭ al la unuaj kristanoj, grandan dankon, pro tio ke ili per sia sango kaj vivo firme establis la kernon de la kristanismo en la bestan aŭ paganan menson de la homaro. Pro tiu ĉi neskuebla klopodo, la unua kristanismo venkis reĝojn kaj imperiestrojn kaj tiel fariĝis akceptita de la aŭtoritatoj, fariĝis reganta ŝtatreligio.

**8. Paganaj tradicioj infektas la kristanismon**

Estis konstuitaj preĝejoj, el kiuj multaj fariĝis veraj lukspalacoj ornamitaj per altaroj kaj grandvaloraj bildoj, skulptaĵoj kaj multaj aliaj artaĵoj. Tradicioj pri nobeloj kaj burĝoj infektis la kristanismon, tiel ke ankaŭ ĉi tie aperis princaro kun rangoj, titoloj kaj ordenoj kaj palacloĝejoj por la plej altrangaj preĝejaj princoj. Ĉi tiuj princoj ne cedis al la tradiciaj reĝoj kaj princoj rilate al vestado de purpuro kaj oro kaj kun krono kaj sceptro. Ĉi tiuj preĝejaj princoj havis dum kelka tempo preskaŭ senliman potencon, kiu estis eĉ pli granda ol la kutima reĝa potenco. Ili povis en certaj okazoj kondmani ilin al punoj kaj ilin "ekskomuniki". Ili povis vendi "la pardonojn de la pekoj", kaj por pekoj, kiujn oni jam faris, kaj por pekoj, kiujn oni eventuale faros!

**9. Netoleremo, inkvizicio kaj mortigado en la nomo de Jesuo**

Kion ne alportis tiu ĉi forto en formo de la inkvizicio kaj la de tiu ĉi sekvanta timo kaj turmentado ĝismorta por multaj homoj? – Jes, oni eĉ iris tiel longe, ke oni benis la militojn kaj konkeris La Sanktan Landon per glavoj, murdoj kaj mortigoj. La kristanaj ŝtatoj kun la tempo fariĝis la plej bonaj militpopoloj de la mondo. Ili atakis kaj konkeris aliajn popolojn kaj ŝtatojn kaj subpremis kaj ekspluatis ĉi tiujn popolojn al propra avantaĝo, ĉio en la nomo de Jesuo.

Oni starigis religiajn ceremoniojn, sakramentojn kaj baptojn, kiujn realigis pastroj, episkopoj kaj papoj en oroentrikitaj noblaj vestaĵoj, kun krono kaj sceptro kaj aliaj imponaj signoj de la rango kaj titolo de la koncernato. Ili estis plejaltgrade netoleremaj al aliaj religioj kaj formoj de dikultado.

**10. Daŭre abundas paganeco en la kristanismo**

Ni do vidas, kiel la evoluo de la homo ne povas okazi salte. La diaecan predikadon kaj estmanieron de Jesuo sekve ne eblis realigi en pura formo. La paganajn tradiciojn kun militoj kaj armiluzado, ceremonioj, rangoj, ordenoj kaj titoloj sekve ne povis esti forigitaj, eĉ se oni akceptis la instruon de Jesuo Kristo. Ĉi tiuj paganecaj tradicioj nur iomgrade adaptiĝis al la kristanismo kaj venis sub la nomon "kristanismo".

Baldaŭ pasis du jarmiloj, ekde kiam Kristo predikis kaj praktikis la kristanismon, kaj kio estas do ĝia rezulto hodiaŭ? – La kristanismo, kia ĝi aperas hodiaŭ funkciigata de la preĝejaj aŭtoritatoj, en multaj manieroj estas daŭre paganismo, sed ĝis certa grado mildigita kaj stampita de la spirito de la kristanismo. La temploj de la paganaj tradicioj ĉi tie fariĝis preĝejoj, kaj la diservo liberiĝis de sangooferoj. En la preĝejoj nek bestoj nek homoj estas oferitaj. Ĉi tie oni provas aperigi la luman diecan etoson per la predikado de la vortoj kaj ordonoj de Kristo pri proksimula amo, suplementita per orgenmuĝo, lumantaj kandeloj kaj pastroj laŭrange vestitaj en pli aŭ malpli multekostaj kaj apartaj vestaĵoj. Kaj plej interne de tiu dikultado kun ekstera oro kaj brilaĵoj do ekzistas la rakonto pri Jesuo kaj liaj propraj vortoj pri la eterna vero, vivo kaj estmaniero. Tuta ĉi tiu ekstera preĝejeca ceremonieca

regiono do estas kiel ia “Kesto de la Interligo”, en kiu la valora vero predikata de Kristo estas konservita. Tiu ĉi ekstera materieca belegeco, pastrovestaĵoj, kandeloj kaj lampoj, orgenmuĝo kaj koruskantado ktp ne konsistigas la veran kristanismon, sed tion tamen faras la puraj vortoj pri amo al Dio kaj la proksimulo, kiuj kelkloke tralumas la eksteran ceremoniecan gloron. Dum ĉi tiu ekstera gloro estas pereema, fariĝos ruinoj, polvo kaj cindro, la vortoj de Kristo ne pereos.

**11. La bezono pri la ekstera gloro de la ceremonioj**

Sed tiu ĉi ekstera gloro estis bezonata kaj daŭre hodiaŭ estas bezonata por homoj, por kiuj la blinda konfido je aŭtoritatoj estas la reganta religia kapablo. Kiam nek la apostoloj nek la poste aperintaj kristanaj pastraroj kaj instancoj havis la aŭtoritaton, kiu elradiis de Kristo, kaj kiu kreis la fidon kaj kredon je liaj predikoj, estis necese krei ion, kio povis doni al la pastroj kaj la ekleziaj instancoj la aŭtoritaton, kiun ili de la naturo ne ricevis, kaj kiu pro tio ne povis doni al ili nek dignon nek aŭtoritaton super tiuj homoj, por kiuj ili havos diservon. Kian aŭtoritaton havus episkopo aŭ iu alia eklezia altrangulo super instinkt- kaj sentodominita homamaso, se li nur estus vestita en ĉiutaga jako dum sia kronado de reĝo aŭ imperiestro? – Ĉu ne estis ĝuste la sama sugestia potenco, kiu rolis en la kurioza vestado de la faraonoj? – Kial generaloj, koloneloj kaj kapitanoj kaj aliaj superuloj armeaj estas simile vestitaj en ĉapeloj kun flirtantaj strutoplumoj, uniformoj kun brilantaj butonoj, orecaj epoletoj, ordenoj kaj medaloj? – Ĉu ne ĝuste por doni al ili aŭtoritaton super la ordinaraj soldatoj, kiujn ili regu? – Kio kredeble okazus pri la aŭtoritato, se la menciitaj superuloj estus vestitaj precize kiel la ordinaraj soldatoj?

**12. Komerco per la pardonado de la pekoj**

Post kiam la unuaj kristanoj forlasis la fizikan sferon, la kristanismo do ŝanĝiĝis pli kaj pli al ceremonioj kaj sakramentoj, per kiuj oni povu ricevi la pardonadon de la pekoj. La estmaniero mem de Kristo fariĝis io, kion oni opiniis ne praktikebla de ordinara homo. Tio estis io, kion nur li povis praktiki, pro tio ke li estis la filo de Dio mem. Sed la homoj povis nur esti pekantoj kaj sekve estis pekantoj, kaj ili devis pro tio fokusiĝi je preĝo pri la pardonado de la pekoj. La bonajn farojn oni ne tiom atentis, pro tio ke oni povis ricevi la pardonadon de la pekoj per preĝi pri ĝi aŭ per partopreni la komunion aŭ eĉ pure fizike aĉeti ĝin per mono. Pli longe for de la predikado de Jesuo oni apenaŭ povas veni.

**13. Instinkt- kaj sentodominita kristansimo sen intelekta praktiko**

La aparta formo, en kiu la kristanismo sekve tra la jarcentoj estis aplikata, estas do pure instinkt- kaj sentodominita stato. Ĝi plene preteriras inteligentecan travivadon. Ĝi tiel transiris al formo, kiu taŭgas por instinkt- kaj sentodomintaj homoj, kio signifas homojn, kiuj plene povas vivi je eldiroj de aŭtoritatoj. Ĉu ĉi tiuj eldiroj estis logikaj aŭ nelogikaj, estis demando tute seninteresa, por tiel diri. Se nur la eldiroj venis de unu el la de ili mem agnoskitaj aŭtoritatoj, sufiĉis. Tiuokaze oni neskueble kredis je tio. Oni do komprenas ĉi tie, ke ju pli ĉi tiuj aŭtoritatoj estis ornamitaj per imponaj oro kaj brilaĵoj, des pli grandaj aŭtoritatoj ili estis por ĉi tiuj homoj. Sed ni vidis, ke tiu ĉi formo de kristanismo ne povis forigi la militojn, same kiel ĝi hodiaŭ ankaŭ ne kapablas instigi pli da homoj transiri al

la vera kristanismo. Ĝi tamen iagrade kunefikas por malgrandigi la preĝejan kristanismon. Ekestas pli kaj pli da malplenaj seĝoj en la preĝejoj.

Tio kompreneble ne signifas, ke ĝi ne estis utila. Spite al tio, ke ĝi en pli alta grado fariĝis ceremonia ol intelekta, ĝi multe antaŭenigis la homojn sur la vojo al la lumo. Ĉiuj humanaj instuticioj, aŭtoritata helpo al maljunaj kaj malsanaj, influo al la opinio pri leĝoj kaj juro, stimulado de ĉiuj pacomovadoj kaj laboro por la forigo de la militoj ktp, esprimas fortojn, kiujn nur eblas esprimi kiel "kristanaj".

**14. La homoj forlasas la religiajn dogmojn pro kreskanta inteligento**

Sed la homoj elkreskas sian religian instinkton, laŭ la kresko de ilia inteligentkapablo. Tiumaniere la kapablo kredi je aŭtoritatoj degeneros. La inteligentkapablo donas aliron al povo pensi logike kaj sekve povi esplori misterojn kaj veni al kompreno pri tiuj ĉi. Ili pro tio ne povas akcepti aserton, kiun ili per sia inteligento vidas nelogika aŭ nevera – kaj tio sendepende de kiu estas la fonto de ĝi. La plej grava por ili kontraŭe estas, ĉu la aserto estas logika kaj povas pruviĝi kiel absoluta realo aŭ almenaŭ kiel verŝajna. Ĉi tiuj homoj devas pro tio iom post iom forlasi la preĝejan kristanismon, ĉar ties respondoj estas adaptitaj nur al la religia instinkto de homoj kaj ne al ilia inteligento. Milionoj kaj denove milionoj da homoj sekve forlasis la kredon je la dogmoj, ĉar ili ne kongruas kun ilia inteligento. Ili trovas ilin nekredeblaj kaj nelogikaj.

**15. La spirita scienco faras la kristanajn klarigojn alireblaj por anlizo per inteligeto**

Ĉi tiuj homoj do povas akcepti ĉefe tion, kion ili povas fizike tuŝi kaj senti. Por ĉi tiuj la dogmoj aŭ la grandaj rezultoj, kiujn Kristo rivelis por la homoj, devas esti alireblaj per inteligenteca analizado por povi esti akceptitaj. Tio signifas, ke la dogmoj estu klarigitaj kaj fariĝu scienco, kiu estu esplorebla. Sed scienco, kiu klarigas la predikadon de Kristo aŭ la grandajn vivrezultojn, nur povas esti tiu de li anoncita "la parakleto, la sankta spirito". Ĝi ne estas homo, kiu venu. Spirito ja estas konscio. Konscio estas pensoj kaj scio. La sankta spirito do estas sanktaj pensoj kaj scio. Sed sanktaj pensoj kaj scio nur povas esti la absoluta veroscio, kiu venu al la homoj kaj informu ilin pri ĉio, kion Kristo diris.

Por ke la homoj povu esti antaŭenigitaj en la dieca kreado, do ne sufiĉas la hodiaŭa reganta "preĝeja kristanismo". Ĝi absolute ne aperas en pura formo. Ĝi daŭre grandparte estas esprimo de hereditaj paganaj tradicioj, al kiuj ĝi kun la tempo devis adaptiĝi pro la nematureco de la homoj pri akceptado de la instruado de Jesuo en pura formo. Laŭmezure ke la "spirita scienco" disvastiĝas kaj regos la homan menson, la preĝeja kristanismo, kaj sekve ankaŭ ties ceremonioj, perdas sian potencon.

**16. La preĝejoj fariĝos muzeoj aŭ memorigaj monumentoj**

La preĝejoj kaj la al ili ligitaj fenomenoj pli kaj pli fariĝos kuriozaĵoj, muzeoj kaj turistaj allogaĵoj, samkiel la grandaj temploj, piramidoj kaj aliaj diokultadregionoj de la prareligioj fariĝis vidindaĵoj, turistaj allogaĵoj kaj muzeofenomenoj.

Ĉu ne la piramidoj en Egiptio kaj Akropoliso en Ateno kaj la ruinoj en multaj aliaj lokoj estas restaĵoj de praaj diokultadoj? – Ĉu ne eĉ la Petropreĝejo mem kaj Vatikano en Romo jam iagrade fariĝis turistaj allogaĵoj kaj vidindaĵoj precize kiel la piramidoj kaj Akropoliso? – Ĉu ne estas ĝuste tiel kun ĉiuj

la multaj preĝejoj, kiuj estas konstruitaj en La sankta Lando sur la lokoj, kie la Jesuo-eventoj okazis? Grandega preĝejo estas konstruita sur la tombejo de Jesuo, granda preĝejo en la ĝardeno de Getsemano, granda preĝejo tie kie Jesuo instruis al la disĉiploj la preĝon Patro nia, granda preĝejo tie kie Jesuo iris ĉielen, granda preĝejo tie kie li naskiĝis en Betlehemo, granda preĝejo apud Betlehemo kie la anĝeloj montris sin por la paŝtistoj kaj anoncis la naskiĝon de Jesuo, kaj granda preĝejo sur la domo de Kajfas, kaj sekve estas konstruita preĝejo sur ĉiu unuopa loko, kie laŭ la tradicio estas indiko pri ligo al la vivo de Jesuo.

Ĉi tiuj preĝejoj kompreneble estas sanktaj por tiuj, kiuj ankoraŭ estas kredantoj de la preĝeja kristanismo, sed por miloj da turistoj ili reale nur estas vidindaĵoj, ĉar ili kovras la lokajn Jesuo-memoraĵojn. Ĉi tiuj preĝejoj de Jesuo-eventoj en La sankta Lando sekve estas "tombaj memormonumentoj" reale. Ili rakontas envere pri io, kio estis, anstataŭ io, kio estas aŭ estos, kiel ajn bonintenca estis la dispozicio de ties konstruinto. Por granda parto de la homaro, ĉiu tiu ĉi preĝeja Kristanismo estas mortanta. La mondo ne povas esti antaŭenigita per ĉia tiu ĉi ekstera formo, per kiu la kristansimo nun estas reprezentata. La homaro ne povas progresi per sugestiitaj fenomenoj, kandeloj kaj lampoj, orecaj pastrovestoj kaj luksecaj tombopreĝejoj pri Jesuo-memoraĵoj.

### 17. La studado de la kosmaj analizoj de la vivo

La estonta kristanismo nur koncentriĝos pri la proksimula amo en la ĉiutaga estmaniero. Nun estas la forigo de la glavo kaj ĉiuj ceteraj militarmiloj, kio gravas por ĉiu unuopa homo, se ĝi volas krei esperon eliri el la nuntempa apokalipsa epoko, en kiu la homaro troviĝas. Nun la nepre necesa estas sin ekzerci pri pardonado. Nun estas la studado de la kosmaj analizoj kaj la de tiu studado rezultanta estmaniero de proksimula amo, kiu gravas. Ne plu estas demando, ĉu la ordono venas de episkopo aŭ rabeno. Nun estas la rekta parolo de la vivo, kiun la homoj lernu kompreni. Ili devas lerni pensi ĝuste, manĝi la ĝustan nutraĵon, reteni sin de saboti siajn organismojn per uzado de alkoholo, nikotino, morfino kaj simile. Nia organismo estas universo de vivantaj estuloj, kaj ankaŭ ili estas niaj proksimuloj. Ni ne povas ruinigi la vivon de ĉi tiuj estuloj kaj mem plu havi sendoloran sorton.

### 18. La forto de la preĝo povas superi ĉion

La homoj devas mem atingi vidi la veran vivon. Nun ili ne plu vidu ĝin tra la preĝeja vualigo, kio antaŭe estis necesa. Nun estas la kapablo brili kaj radii simpation, amon kaj pardonemon al nia proksimulo, kio gravas. Por tio ni havas la forton de la preĝo, kiu estas enkonstruita en ĉiu unuopa estulo. Per la uzado de ĝi, oni povas superi ĉion, kaj tra ĝi oni povas paroli kun Dio kaj sekve ekhavi kontakton kun li. Post kiam oni ekkonscias pri tiu ĉi kontakto, fariĝos facile migri la ceteron de la vojo al la lumo.

Ĉi tiu artikolo estas manuskripto, kiun Martinus verkis prepare al prelego en la prelegejo de la Instituto de Martinus en Kopenhavo la 29an de oktobro en 1961. Li kutime ne uzis manuskripton dumprelege. La origina titolo estas "Kristanismo", sed ĉar ekzistas multaj prelegoj de Martinus kun tiu titolo, ĝi estis ŝanĝita al "Vera kristanismo". Dividis en alineojn kaj verkis alinetitolojn Ole Therkelsen. La artikolon aprobis la estraro de la Instituto de Martinus. Tradukis ĝin el la dana Hokan Lundberg kun Henning Sato von Rosen. Artikolo n-ro: M1178.



# La kristana moralo

de Ole Therkelsen

### 1. Verkaro kiu povos ŝanĝi la mondon

La verkaro de Martinus estas tiel epokfara ke ĝi povos kunhelpi *ŝanĝi la mondon kaj formi fundamenton por la kreo de tute nova monda kulturo kun nova monda moralo.*

La verko de Martinus estas intelektigita kristanismo aŭ sciencigita kristanismo, kiu montras ke *la vortoj kaj kondutmaniero de Kristo estas konformaj al la plej alta formo de logiko kaj scienco.* Martinus karakterizas Kriston kiel moralan genion, kiun ne eblas superi en la morala kampo. La moralo kiun Kristo praktikis, reale estas la nova monda moralo, kiu iom post iom superregos la tutan planedon. Ne la malnova venĝomoralo kun reprezaliado savos la mondon el milito kaj detruo, sed male la kristana moralo.

### 2. La efikoj de la memcela kaj egoisma vivmaniero

La evoluo de la biologia korpo estas la plej grava parto de la evolucia teorio de biologio, dum la evoluo de la konscio al ĉioamo estas la plej grava parto de la evolucia teorio de Martinus.

La principo de reenkarniĝo garantias la evoluon, ĉar ĝi ebligas akumuladon de rikoltitaj spertoj kaj eltrejnitaj kapabloj el pli fruaj vivoj. Tiuj spertoj kaj kapabloj konserviĝas en talentkernoj, kiuj estas spiritaj organoj aŭ “mikroĉipoj”, postenigitaj en tiu eterna parto de la strukturo de la estulo, kiu postvivas la pereon de la korpo. Ĉiuj lernitaj kaj akiritaj kapabloj tiamaniere estas transkondukeblaj al la sekva vivo. La esenca penso de la evolucio laŭ Martinus do estas ke ekzercado estigas majstron!

La plej granda kaj grava talento kiun homo povas evoluigi, estas humaneco aŭ amo. Tiu estas la kerno de la tuta evoluo el besto al homo, el egoismo al ĉioamo.

En la naturo la besto kaj la homo ambaŭ estas devigitaj batali kaj forpuŝi aliajn por pluvivi mem. Tiu egoisma vivmaniero tamen donas sorton en kiu oni mem travivos la multajn suferojn kiujn oni kaŭzis al aliaj. La multegaj suferoj sur la tero ne estas vanaj, ĉar ili donas la spertojn necesajn por plukonduki la estulojn en homa evoluo. Mem sentinte doloron, oni evoluigas talenton de kunsento; mem suferinte, oni evoluigas kompaton. Kunsento, kompato, humaneco kaj amo al la proksimulo estas ecoj aŭ kapabloj kiuj konserviĝas kiel talentkernoj en la eterna parto de la konscio.

*La doloro kaj la sufero* do donas al la homo la plej dian donacon kiun ĝi povas ricevi, nome *humanecon kaj amon al la proksimulo.*

### 3. La tria sekso

Granda temo de la kosmologio estas la pasintaj 3500 jaroj kun *La Malnova Testamento* kaj *La Nova Testamento* kaj la estontaj 3000 jaroj kun *La Tria Testamento.* La lasta lernotaĵo de la homoj estas la scio esti utila, ĝojiga kaj bena al ĉio vivanta, kaj tio signifas vivi

harmonie kun la vivleĝo aŭ la granda ordono de la amo, "amu unu la alian".

La konscio kaj seksa strukturo de la homo trairas tre grandan transformiĝon dum ĉi tiuj jarcentoj. Tion Martinus priskribis sur pli ol 500 paĝoj en la tuta *Livets Bog (La Libro de la Vivo) 5,* la libro *Du specoj de amo* kaj *La Eterna Mondbildo 3,* simbolo n-ro 33.

Jam en 1932 en *Livets Bog* 1, par. 130-132, Martinus ekdiskutas la seksan transformiĝon de la tera homo, kiu okazas en tri grandaj ŝtupoj: la zono de feliĉaj geedzecoj, la zono de malfeliĉaj geedzecoj kaj la zono de sterileco. Tiu evoluo el besto al homo, el egoismo al altruismo, el partia amo kaj enamiĝo al senpartia ĉioamo, sekvas la naturajn leĝojn aŭ la horaron de la evolucio.

La ekesto de novspeca homo niatempe konstateblas interalie per tio ke viroj kaj virinoj ĉiam pli intersimiliĝas. – Ekkreskas vireco en la virino kaj virineco en la viro, kio estas la organika bazo de la komenciĝanta evoluo de seksa egaleco. La evoluo el besto al homo laŭ Martinus ne nur estas natura, sed ankaŭ neevitebla procezo en la kreiĝo de "la finita homo laŭ la bildo de Dio", kiu konsistas el dupolusa estulo kun vira kaj virina polusoj en perfekta ekvilibro. La finita homo amas ĉiujn kaj havas neniujn favoratojn, ĉar ĝia dupoluseco ne plu havas mensan organikan antaŭkondiĉon por preferi unu sekson anstataŭ la alian. Dio, kiu estas la sumo de ĉiuj vivantaj estuloj, do en si mem ankaŭ estas dupolusa.

La plej granda surprizo de la Kosmologio de Martinus certe estas ke laŭ la leĝoj aŭ horaro de la evolucio ekestos *nova sekso – tria sekso.* Oni antaŭsupozas ke, se dum la pasinteco estis viroj kaj virinoj, se dum la nuntempo estas viroj kaj virinoj, tiam dum la estonteco daŭre estos viroj kaj virinoj. Sed laŭ Martinus ne daŭre estos viroj kaj virinoj, kiel dirite ekestos tria sekso! – La trian sekson reprezentas la dupolusa sekso, kiu en sia plene evoluinta stato havas virecon kaj virinecon en egaleca ekvilibro en la menso. Inoj kaj malinoj, viroj kaj virinoj estas duonseksaj estuloj, kiuj vivas en reciproka interdependeco.

La evoluo de la grade ĉiam pli dupolusa homo, kiu en sia fina fazo estos kompleta kaj tute memstara, statistike montriĝas per tio ke ĉiam pli da plenkreskuloj vivas solaj. La laŭgrada evoluo de dupoluseco kaŭzas ankaŭ ke oni iom post iom povas havi simpation al sia propra sekso. Laŭ la analizoj de Martinus la dupolusa mensostato en pli posta momento de la evolucio kompletiĝos per nova dupolusa organisma tipo. (Vidu *Livets Bog* 5, par. 1886-1918).

La antaŭdiron de Martinus pri la evoluo de dupolusa homo oni povos science dokumenti mapante difinitajn kvalitojn de la homo dum la paso de la historio. Tia programita aŭ leĝe difinita evoluo el la instinkta kaj unupolusa besto al la intelekta kaj dupolusa homo tute transpaŝas la limojn de la darvinismo, kiu bazas sin ekskluzive sur hazardoj kaj la natura selektado. Ĉi-kampe la analizoj de Martinus pri la seksopolusa ŝanĝiĝo de la homo distingiĝas kiel tute unikaj, kaj ili kiel dirite havas tre bonan eblecon esti testotaj per sciencaj esploroj.

*Unupoluseco estas la anatomio de la milito*
*Dupoluseco estas la anatomio de la paco*

**4. La dupolusa Kristo-estulo**

Laŭ la analizoj de Martinus Kristo apartenis al la tria sekso, li estis dupolusa kun la virina kaj vira polusoj en perfekta ekvilibro. (LB5, par. 1892-1895). Kvankam Kristo havis viran

korpon, lia mentaleco estis komplete dupolusa kaj ĉioama. La dupoluseco nome estas la organika antaŭkondiĉo por povi praktiki tute nepartian amon en la formo de la amo al la proksimulo.

La analizoj montras ke ĉioamo kaj seksemo estas unu sama principo, kaj Martinus ankaŭ preterpase mencias la seksecon de Jesuo tie kie li skribas ke la koro de Jesuo ne estis glacibulo. (Logiko, ĉap. 36-37).

Martinus ne specife skribas ĉu pri sia sekseco, ĉu pri tiu de Jesuo, sed se oni dezirus scii pli multe pri tio, eblas indiki la ĝeneralan analizon pri la sekseco de la dupolusa kaj kosme konscia homo en *Livets Bog*. (*Livets Bog* 5, par. 1900-1909).

En prelego Martinus substrekas ke li ankaŭ mem estas tute dupolusa kun la vira kaj virina polusoj en perfekta ekvilibro.

Martinus: "Mi estas dupolusa, mi estas en perfekta ekvilibro. Mi havas la kosman konscion." (Prelego en Klint la 26-an de junio 1977).

Organika antaŭkondiĉo por atingi plenan kosman konscion estas ke la homo havu la du seksajn polusojn ekvilibraj, tial neniu geedzece inklina viro aŭ virino povas ekhavi kosman konscion. (LEM3 simbolo n-ro 33 kaj Artikolaro 1 par. 41.27-41.29).

**5. Ĉiuj homoj sur la tero estos ĉioamaj kaj per tio "kristanoj"**

La evoluo estas kiel unudirekta strato, la tera homo neeviteble estos Kristo-estulo. Al Martinus esti kristano ne temas pri tio ĉu oni estas kredanto, ĉu oni estas protestanto aŭ katoliko, ortodoksulo, mormono ktp. Esti kristano temas pri tio ke oni estu ĉioama kaj praktiku la kondutmanieron de Kristo. Se la kristanan kondutmanieron praktikas hinduo, islamano, budhano aŭ materiisto, tiam la koncerna homo estas kristano!

Martinus: "La homoj de la tero ankoraŭ ne fariĝis kristo-estuloj aŭ kosme naskitaj Budhoj, sed ili ankaŭ ankoraŭ ne komprenis kio estas vere kosme naskita Kristo aŭ Budho aŭ la vere perfekta aŭ finita homo." (*Livets Bog* 7 par. 2432).

Esti "kristano" signifas esti utila, ĝojiga kaj bena al ĉio vivanta, kaj tio reale estas interplaneda aŭ universala principo de amo.

En Ĝenevo troviĝas la ĉefcentro de la Ekumena Societo, kiu estas asocio de pli ol 2000 kristanaj konfesioj, el kiuj ĉiu havas sian interpreton de la kristanismo kaj de la krucumo. Ofero, peko, graco kaj savo estas kelkaj el la nocioj kiuj grave rolas en tiuj interpretoj.

Martinus havas sian propran kosman ekzegezon pri la signifo de la krucumo de Jesuo. Koncize dirite, la kerno de la jesua misio estas ke li devis esti la modelo de la perfekta homo. En karno kaj sango devis esti montrita la perfekta kondutmaniero al la homoj de la tero. La kulmino de tiu montrado de ĉioamo estis la krucumo, en kiu Jesuo, torturata ĝismorte en la plej teruraj doloroj, povis senti amon kaj simpation al siaj ekzekutistoj eldirante: "Patro, pardonu ilin; ĉar ili ne scias, kion ili faras". (Luko, 23.24). Li ne nur povis eldiri tiujn vortojn, sed per sia tuta koro sentis veran amon al siaj ekzekutistoj aŭ tiuj pli junaj fratoj en la evoluo.

**6. La tergloba estulo spertis kosman ekbrilon ĉe la krucumo de Jesuo**

La krucumo laŭ Martinus estis la plej granda elmontro de ĉioamo en tiu ĉi mondo. En la Biblio estas rakontite ke la kurteno de la sanktejo disŝiriĝis en du pecojn de supre ĝis malsupre. La tero tremis kaj rokoj diskrevis, kaj la tomboj malfermiĝis, kaj multaj korpoj de dormantaj sanktuloj leviĝis, kaj elirinte el la tomboj post lia releviĝo, ili

eniris en la sanktan urbon kaj aperis al multaj. (Mateo, 27.51-53). – Laŭ Martinus tamen ne estis tiel ke la mortintoj leviĝis el la tomboj, sed ke je la spirita nivelo ĉeestis kristo-estuloj, kiujn kelkaj klarvidantoj kapablis vidi ĉe la krucumo.

La krucumo estis nenio malpli ol kosma monda evento. Ĝis la krucumo venĝado estis logika. Denton por dento kaj okulon por okulo estis la superreganta principo. Sed *post la krucumo ne plu estis logike defendi sin kaj rebati,* ĉar tute nova solvo estis demonstrita sur la kruco. Ĉe la krucumo la homara milionjara kultura bazo estis turnita for de la *ataka principo* kaj la *defenda principo* al la *pardona principo.*

Martinus skribas ke la tergloba estulo eĉ spertis *kosman ekbrilon* ĉe la krucumo de Jesuo. Martinus vidas la krucumon kiel eron de la inico de la terglobo en kosman konscion. (La Intelktigita Kristanismo, par. 27-29).

En siaj lastaj prelegoj Martinus ofte parolis pri tio ke la defenda principo estas la plej granda skurĝo de la homaro, t.e. ĝia plej granda problemo. Ne la pardona principo, sed la defenda principo estas la fono de la tuta armado sur la planedo. Oni opinias ke oni defendante sin rajtas mortigi aliajn.

Laŭ la kosmaj analizoj la defenda principo kaj la armado ligita al ĝi rezultigos plurajn mondajn militojn. Sed fine la militoj ekstermos sin mem, ĉar post ĉiu milito ĉiam pli kaj pli da homoj diros: "Neniam plu milito". – Milito estas la vojo al paco. La militoj tiusence estas pacifisto-bredejoj. La militoj estas elemento de dia plano. Pere de la militoj Dio kreas verajn homojn laŭ sia bildo.

Martinus opiniis ke oni ne bezonas timi la militojn, ĉar la karma leĝo logike eldiras ke oni mem estas protektata tiagrade kiom oni aliajn protektas. Iuj homoj kaj iuj landoj estos protektitaj kontraŭ milito, dum aliaj ne estos. Se oni ne estas protektita kontraŭ milito, estas pro tio ke pliaj militospertoj estas bezonataj por la plua evoluo al perfekteco kaj amo al la proksimulo.

Sed en la fino ĉiu homo atingos tiun kristanan stadion kiam ĝi povos diri, ke se unu el ni estu mortigota, mi preferas ke la mortigoto estu mi! – Neniu havas pli grandan amon ol tiu kiu donas sian vivon pro aliaj! – Se ĉiuj kondutus kiel Jesuo, ne estus milito sur la tero.

En paca mondo ĉiu unuopa homo konsistigos ĉelon da paco. La plej granda kontribuo kiun oni povas doni por paco en la mondo, estas labori por transformi sin mem en ĉelon de paco. Oni ne aliajn konvertu, oni konvertu sin mem. Al la unuopulo la granda laborkampo estas pardoni al siaj tiel nomataj "malamikoj", tio estas al ĉiuj homoj kiuj onin agacas, kontraŭas, aŭ faras al oni problemojn.

*Oni ne ŝanĝu la mondon,*
*oni ŝanĝu sin mem*

**7. La granda ordono de la amo: Amu unu la alian!**

En *Kosmos* de januaro 1935 Martinus skribis novjaran saluton en la formo de artikolo akompanata de desegnaĵo kun la teksto *Elsker hverandre* (Amu unu la alian), kiu estas la granda ordono de la amo. (LEM4 simbolo n-ro 44).

Martinus komencas la artikolon tre poezie, komparante la terglobon kun ŝipeto veturanta sur la senmezura marego de la eterneco. Tiu ŝipeto ŝvebas inter la steloj. Ĝi vojaĝadas tra la spaco. Ĉiuj vivantaj estuloj sur la tero estas pasaĝeroj, inter kiuj la homoj estas la plej elstaraj. Per tiu kosma vojaĝo la homaro kaj la terglobo survojas al kosma konscio en ĉirkaŭ 3000 jaroj.

Tiu artikolo, verkita kvin jarojn antaŭ la eksplodo de la dua mondmilito, estis preskaŭ "artikolo pri la tago de la




© Martinus Institut 1981 Reg. 44

*Simbolo n-ro 44 – Amu unu la alian*

lasta juĝo”, sed ĝi eble reaktualiĝis nun kiam la homaro kredeble staras antaŭ la eksplodo de tria monda milito. En la pozitiva flanko Martinus diras ke la spertoj kiujn la homoj faros al si dum la teruraj militoj, helpos levi la planedon sur pli altan kristanan nivelon kaj spirite ĵeti la teron en novan kosman orbiton. Martinus ne rigardas la tagon de juĝado tiel kiel oni faras en la teologio, li vidas la tagon de la lasta juĝo kiel simbolan esprimon de epoko da militoj kaj katastrofoj, en kiu ni lernas el niaj spertoj. Martinus skribas ke la tago de juĝado komenciĝis per la unua mondmilito kaj ke ĝi de hodiaŭ daŭros pliajn ĉ. 100 jarojn.

Martinus: “Vi ne scias la tagon nek la horon. – Sed la tempo estas proksima. La morto, la afliktoj kaj la suferoj havos denove grandan rikolton sur la kontinentoj de la tero, kaj la plorado kaj la grincado de dentoj kulminos denove. Tial la dia averto, ‘viglu kaj preĝu por ke vi ne eniru en tenton, la spirito ja estas fervora, sed la karno estas malforta’ sonoregu tra la mondo kun nova forto. Ĝi devus sonoregi pere de la radiofonio tra la tuta mondo, ĝi devus esti aŭdebla eĉ en la vilaĝetoj de la zuluoj kaj la branĉaj kabanoj de la fajrolandanoj, kaj tute supren ĝis la plej nordaj loĝlokoj kaj glacidezertoj, kiel ankaŭ tra la Oriento kaj Okcidento. Ne eblas tro forte diskrii ke la tero rapidas al la ‘mondofino’. Ĉiuj estu pretaj. Granda plano en la dia kosma ordo estas kompletigota. La tero ĵetiĝos en novan orbiton, kaj ĉio kio ne estas el ‘pureco’ de amo, devos resti ekstere. La fortaj vibroj de la zono de la Patro dissolvos ĉiujn detalojn, kiuj ne estas izolitaj en amo.” (Martinus, *La Eterna Mondbildo* 4, par. 44.3).

**8. La simbola desegnaĵo Amu unu la alian**

En la desegnaĵo oni vidas tri homparojn, meze viron kun virino kaj flanke du virinojn kaj du virojn, kio simbolu ĝuste la ĉioamon, ke oni povas ami sendepende de la sekso, aŭ alivorte dirite, ke oni povas ami ankaŭ sian propran sekson.

En radiodissendo la 6-an de septembro 1980 ("Ved dagens begyndelse" en Danmarks Radio P1), Martinus diris ke ragnaroko baldaŭ trafos la teron, kaj tion li motivis per tio ke la defenda principo neeviteble rezultos en ragnaroko. (*Kosmos* n-ro 1/2005). Tial la artikolo de 1934 kredeble plu havas grandan aktualecon.

Martinus: "Dum la homa specio sin armas por batalo, mortigado kaj kripligado, dum la 'pasaĝeroj' en la malluma flanko preparas sin ne por alturni la dekstran vangon batite sur la maldekstran, ne por cedi al sia proksimulo, sed male por igi lin sklavi laŭeble plej multe, konservi sian propran vivon en lukso kaj ĝojo koste al sano kaj membroj, feliĉo kaj bonfarto de aliaj, kaj fine por laŭeble plej multe venĝi, malami kaj persekuti, la tero kiel dirite plu ruliĝas en novan grandiozan kosman lum-ondon, kiu el 'la zono de la Patro' ĵetas siajn radiojn antaŭen tra la spaco. Tiu lum-ondo akcelegos la evoluon de la tero. Sed akcelado de la evoluo signifos pliigon de la suferado. La restanta parto de la suferoj de la homoj de la tero, kiuj estas la revenantaj efikoj de la kaŭzoj kiujn ili produktadis pro sia erara vivmaniero, koncentriĝos dum relative mallonga tempodaŭro. Pro tio la suferoj estos pli fortaj, ol se la dissolviĝo okazus dum pli longa tempo. Sed kompense tio kaŭzas ke ankaŭ la kurso de la tero al la regionoj de la lumo estos akcelita, kaj sekve la ĉiela ŝipo de la homaro en la daŭro de malpli ol tri jarmiloj sukcesos ne nur 'ekvidi la promesitan landon', sed ankaŭ alveni tiel profunden en ties lumregionojn, ke la ombraj flankoj je la dirita tempo estos plejparte forigitaj. Tiam la tero estos preterpasinta la bestan zonon, la mortigan principon, kaj ĝi ne plu estos transportilo de afliktoj, malsano kaj kripligado, sed finfarita pasado tra la zono de sufero ĝi fariĝos kosma 'veturilo' kun 'diaj vojaĝantoj', kiuj 'finfaris la veturon', atingis la saĝon, fariĝis unu kun la Patro." (Martinus, *La Eterna Mondbildo* 4, par. 44.4).

La teksto venas el la libro "Martinus kaj la nova monda moralo" verkita de Ole Therkelsen. La libro ekzistas en Esperanto. Tradukis la tekston el la dana Jens Stengaard Larsen.



# Naciismo kaj internaciismo

de Martinus



M1750

**1. La nacia ideo prezentas la plej profundan religian instinkton de la grego**

Dum la lastaj jaroj la vorto naciismo estas uzata de ĉiuj homoj. Fakte tiu vorto esprimas malnovegan principon, nome la gregokulton. Tiu principo estas prainklino kaj ne iu politika aranĝo inventita de homoj. Fundamente ĝi ekzistas en la bestoregno mem kiel aranĝo de protektado. Multaj specioj de bestoj povas pli bone sukcesi en la batalo por la vivo kiam ili agas en gregoj, kiel faras ekzemple vulpoj, leonoj, bubaloj, simioj ktp. Kaj kiamaniere la unuopa formiko aŭ abelo povus bone vivi se ne ili estus ligitaj ĝuste al sia socio? Ni vidas ke la sama gregemo influas ĉe la homoj de la pratempo. Ĉe ili ni renkontas la tribokoncepton en ĝia unua formo, kaj laŭhistorie ni scias kiel tiuj triboj estis la unua komenco de la multaj nacioj el kiuj konsistas la nuntempa mondo. Rigardante modernan ŝtaton ni vidas ke unu el la plej bazaj trajtoj de ĝia strukturo estas ĝia sinteno al la nocio suvereneco. Tio signifas ĝian absolutan sendependecon de aliaj ŝtatoj aŭ nacioj. Esti kaj resti suverena estas la plej nobla ideologio de ĉiu ŝtato, kaj tiu ideologio estas la absoluta bazo por ĝia politiko, ĝia religio kaj ĝia lerneja instruado, sed antaŭ ĉio por ĝia armeo. La nacia ideo estas do la plej profunda religia instinkto de la grego, ja efektive la nacia ideo estas ĝia superreligieco, tiu por kiu ĝi estas plej preparita doni sian vivon.

**2. "Iru en la mondon kaj faru ĉiujn popolojn miaj disĉiploj"**

Male al tiu nacia ideologio troviĝas la ideologio de la mondreligioj. Ĝi havas tute internacian naturon, kaj tio signifas ke ĝi estas kontraŭ gregoformado, kontraŭ kreo de suverenaj nacioj aŭ ŝtatoj. La kristana mesaĝo: "Iru en la mondon kaj faru ĉiujn popolojn miaj disĉiploj", kiu ja estas la plej profundaj enhavo kaj misio de la kristanismo, montras tute alian ideologion ol tiun kiu regas en la politiko de la unuopaj ŝtatoj. Farante ĉiujn homojn, ĉiujn popolojn kaj per tio ĉiujn rasojn disĉiploj de la kristanismo, kio signifas disĉiploj de la proksimula amo, do efektive oni kontraŭbatalas la esencan ideon de la naciismo aŭ izolismo. Ja, la plenumo mem de la kristana espero ke estiĝu unu grego kaj unu paŝtisto, tio efektive signifas pereon de ĉia naciismo ĉar la fina plenumo estas imagebla nur kiel la kreado de unu mondoŝtato ampleksanta ĉiujn unuopajn ŝtatojn, kaj kun centra registaro komuna por ĉiuj tiuj antaŭe memstaraj ŝtatoj. Se oni forigus tiun ĉefan ideon de la kristanismo, por kio do eblus batali?

**3. Moseo donis al la juda popolo fundamenton de gregoformado, aŭ izolismon**

Neniam ajn iu homo donis pli bonan fundamenton por grupoformado aŭ izolismo ol tiun kiun Moseo donis al la juda popolo. Tie ni vidas adoron al la grego en pura formo. Tie ni renkontas

izolismon en tiel firmega stato ke dum la pasintaj jarmiloj ĝi povis rezisti ĉiujn atakojn, kvankam fojon post fojo tiu popolo necese ekziliĝis por finfine fuĝi dise en la tuta mondo. Pelata, mokata kaj blasfemata de la ceteraj popoloj de la mondo tiu popolo daŭre konservis sian internan unuecon, sian koncepton pri si mem kiel "la elektita popolo de Dio". Kaj vidu per kiu forto ĝi nuntempe agas en Palestino post ekzilo dum jarcentoj.

**4. Tiu inklino izoli sin, kiu karakterizas la judan popolon, troviĝas en ĉiu nacio en nia mondo**

Sed ĉu ne same tiu inklino izoli sin, kiu karakterizas la judan popolon, troviĝas en ĉiu nacio en nia mondo? La malrespekto de aliaj ŝtatoj al tiu kredo de iu nacio ke ĝi rajtas esti si mem, ĉu ne tio daŭre kondukas al ribeloj, tumultoj kaj militoj? Kaj ĉu ne ĝuste tiuj militoj evoluis de bataletoj inter la unuopaj triboj al tiu "ragnaroko" kiu komenciĝis en 1914, kaj kiu post tiam estas monda brulo nuntempe ŝajne neestingebla? Estas vere ke seninterrompe okazis klopodoj de "pacigoj", sed kion ili signifas kiam estas evidente ke ili estas nur la necesaj interrompoj por kolekti fortojn kaj materialon por novaj krudaj manifestaĵoj de milito kaj perforto? Tiel longe kiel paciĝo estas bazita sur okupacio ĝi neniel povas esti io alia ol provizora militpaŭzo. Ĉi tie mi pensas ne nur pri tiu okupacio kiun la venkintoj de la pasinta milito tiam konservis en la venkita lando. Multe pli mi pensas pri tiu okupacio kiun pro la nacia ideo la respektivaj nacioj konservadas en si mem.

**5. Naciismo estas speco de forrabo de la libero de la membroj de ŝtato, sed troviĝas pli alta mondplano kiu malhelpas fari teron dezerta kaj senviva planedo**

Ĉu oni do povas nomi naciismon okupacio? Ĉu ne okupacio estas ekskluzive tio ke forrabo de libero estas farita de alia ŝtato? Ne, tiel ne estas! Kiam popolo vivas sub tiaj kondiĉoj ke neniu povas aĉeti paron da ŝtrumpoj, kilogramon da sukero, litron da petrolo, aĉeti benzinon aŭ aliajn gravajn vivbezonaĵojn sen la permeso de la ŝtato do necese ekzistas potenco super tiu de la ŝtato, kaj pere de kiu konserviĝas tiu forrabo de libero. Tiu potenco kiu do troviĝas super tiu de la ŝtato, kaj kiu kapablas tirani la membrojn de la ŝtato per daŭre kreskanta forrabo de libero, ja eĉ devigas la ŝtaton mem organizi sin laŭ la plej modernaj gangsteraj metodoj kun priraboj kaj rompoj de la posedrajto, do tiu potenco estas la plej alta formo de okupacio. Nuntempe ĉiu unuopa nacio en la mondo militas kontraŭ la origino de tiu potenco. Tagon post tago ĉiuj nacioj de la tuta mondo estas pli kaj pli premataj al la tero de tiu potenco kiu fakte minacas la tutan homaron per ekstermo. Se ne ekzistus pli alta mondplano senfine supera, do finfine tiu forta potenco farus la teron neloĝebla lunregiono, dezerta kaj senviva planedo.

**6. Por la primitivaj triboj en la praarbaro "naciismo" estis absoluta bono. En nia materia kaj scienca mondo ĝi kreas tiun "juĝotagon" kiun proklamis Kristo**

Dank' al la dia mondstrukturo tio ne povas okazi. En la dekunua horo la homaro finfine ekvidos tiun monstron kiu estas ĝia vera kaj plej danĝera malamiko. Nuntempe tiu malamiko tenas la homaron ligita al forrabo de libero, restriktoj, manko de varoj, ja al tiu mizero kiu karakterizas la nuntempan mondan socion. Tiu monstro ne estas iu alia ol tiu penskoncentraĵo al kiu ni donis la nomon naciismo. Naciismo nome ne estas tiu bela idealo kiel ĝi estas konceptata, sed efektive ĝi estas psikozo kiu iom post iom dezertigos ĉian kulturon se ne la kultado al ĝi

estos haltigita. Ĉar tiel same feliĉiga kiel estis tiu penskoncentraĵo antaŭ jarcentoj, tiel same malfeliĉiga ĝi estas nuntempe. Tion oni povas facile kompreni kaj vidi turnante la radon de la evoluo nur paron da cent jaroj reen en la tempo, reen al tiu tempo kie la ĉevala ĉaro estis la plej altranga transportilo kaj kie praktike oni ne konis homojn en aliaj landoj. En mondo kie ĉevala ĉaro estas la pinto de la trafikiloj, kaj kie oni estas komplete memproviza, tie ĉia politiko neeviteble temas pri la internaj aferoj de la nacio. En tiu situacio la nacio preskaŭ ne havas eksterajn aferojn. Tribo kiu vivas en la praarbaro sen kontakto aŭ kunesto kun aliaj triboj, ja eble eĉ ne scietas pri la ekzisto de tiuj aliaj triboj, ĝi ja neniel povas kolizii kun tiuj triboj. En tia situacio ĝia pensmondo povas temi nur pri ĝia propra bonfarto. En tia situacio la naciismo estas kompleta kaj tuta beno. Tie ĝi signifas ke la grego agas kune. Ĝi signifas la unuigitajn fortojn de la grego. En tia kazo tiuj unuigitaj fortoj neniam povas kaŭzi militon aŭ akcidenton, nek por la grego mem nek por aliaj.

Sed la modernaj kulturaj ŝtatoj de la nuna tempo ne vivas izolitaj sammaniere kiel la tribo de la praarbaro. Ili vivas unu apud la alia, ja eĉ en multaj kazoj estas vivkondiĉe dependaj unu de la aliaj. Iom post iom tiu najbareco kreis strukturon kiu sur multaj kampoj faris tiujn modernajn ŝtatojn unuo. Pere de la rapide kreskanta teknika kaj kemia scio tiuj ŝtatoj kapablis venki ĉiujn distancojn, kaj tio kondukis al grandegaj scio kaj informo pri vivo kaj regionoj de aliaj nacioj kaj kontinentoj. La rezulto de tio estas grandega interŝanĝo de varoj inter tiuj ŝtatoj, grandega interrilato kiu kondukis al kreado de grandioza industrio kies enorma produktado estas destinita tute al tiu grandioza interrilato de tiuj nacioj.

Iam aspektis kvazaŭ tiu evoluo rezultigus homan feliĉon en tiam tute ne konataj dimensioj. Sed en la evoluo unu afero ne konformis al la granda horizontvastiĝo de la homo. Tiu afero estis la koncepto pri ĝia propra grego, ĝia propra popolo aŭ nacio. Tie ĝi daŭre konservis la konscion de la praarbaro. Samtempe kun tio ke la homo preskaŭ senobserve transformiĝis al civitano en tute nova regno, nome tiu kiu estiĝis ĉirkaŭ ĝia "praarbara regiono", kaj samtempe kun tio ke ĝi povis vojaĝi tra la tuta mondo, ja eĉ paroli al la tuta mondo, kaj pere de radiofonio povis aŭskulti tutan mondon, samtempe kun tiuj faktoj ĝi rifuzis sian novan identecon kiel mondcivitanon kaj kroĉis sin al tiuj imagoj kiuj estis la feliĉo en "la praarbaro", kaj ĝi kroĉis sin al tiu regiono kiu antaŭe estis "la mondo" de la ĉevala vojaĝa ĉaro kaj la rajdoĉevalo.

En ĝia konscio tiu eta regiono restis "la centro de la mondo". Daŭre ĝia popolo estis "la popolo elektita de Dio". La homo kultis tiun sian popolon, ties flagon kaj ĝiajn naciajn simbolojn kiel esprimon de io plej alta en la mondo. Kaj ne sciante, la homo sekve fariĝis perfidulo kontraŭ la granda nova mondo en kiu – pere de ĝia plivastigita konscio, ĝiaj kreskantaj materia kaj scienca kapablo – Dio faris ĝin civitano. Kaj ju pli la homo kultis la nacion des pli ĝi perfidis la grandan novan mondoŝtaton kiun ĝi tute ne povis malhavi kaj en kiu ĝi tute ne povis eviti vivi. La rezulto de tio neeviteble fariĝis, kiel la mondliberiganto jam proklamis, disfalo, "juĝotago".

**7. La nacie sintena homo iom post iom malaperos avantaĝe al la internacie sintena homo**

La konscio de la moderna homo ne plu estas nur "praarbara konscio" aŭ "helika konscio" por kiu sufiĉas moviĝi en

la paroĥo en kiu ĝi loĝas. Nuntempe ĝi estas naskita ne nur kiel nacia homo, sed tre altgrade ankaŭ kiel internacia homo. Nacia homo estas homo kun scio nur pri la internaj cirkonstancoj de la nacio, sed kiu estas komplete nescia kaj komplete neinteresita pri la mondo kaj la ŝtatoj ĉirkaŭe. Sed homo kiu nuntempe naskiĝas en moderna kultursocio estas de la naskiĝo edukata al scio pri ĉiuj internaciaj cirkonstancoj. Kiel tute memkomprenebla afero ĝi lernas pri la ekzisto de aliaj landoj, kaj same memkompreneble ĝi ricevas de tiuj landoj sennombron da kulturaj impulsoj. Tial preskaŭ senatente ĝi pli kaj pli havas internacian sintenon. Ĝi ja komencas senti eĉ certan abomenon al ĉiu el siaj kunhomoj kiuj laŭ ĝia opinio tenas sin for de la influo de tiuj kulturaj impulsoj, kaj kiuj homoj sekve laŭ ĝi estas nur tedaj kaj spirite limigitaj "hejmsiduloj". Estas certe ke iun tagon tia internacie sintena kaj edukita homo vidos malsaĝon en tio, ke pro la naciismo ĝi estas devigata perfidi sistemon de kiu ĝi dependas rilate al preskaŭ ĉio.

### 8. La mondoŝtato estiĝis kiam la unua ĉirkaŭtera vojaĝo estis farita, kaj post tiam ĝi daŭre stabilis sian ekziston

Nuntempe la vera malbono aŭ malfeliĉo de la homaro estas ĝia ĵurado al la naciismo. La unuopa homo ne plu estas membro de praarbara tribo aŭ civitano en memproviza socio kie la ĉevalo estas la kulmino de la trafiko. Ĝi multe pli evoluis en sia transformo de besto al homo, en sia transformo por fariĝi laŭ "la bildo de Dio". Sekve ĝi devas nun lerni kompreni ke ĝia kultado de la nacia ideo estas izolado, forteno de tiu mondoŝtato kiu nun fariĝas vivkondiĉo ne nur por ĝi mem, sed ankaŭ por ĉiuj ĝiaj kunhomoj. La homo devas lerni adapti sin al tio ke la mondoŝtato pli gravas ol ĝia propra nacio, ĉar la mondoŝtato ne estas io, kio nun ekestas, ĝi ekestis kiam la unua ĉirkaŭtera vojaĝo estis farita, kaj de tiam ĝi daŭre stabiligas sian propran ekziston. Ĉiuj homoj estas civitanoj en tiu mondoŝtato, sed tion ili ne scias. La granda plimulto daŭre ĵuras al la naciisma ideo, kaj kun tiu sinteno la naskiĝo de la mondoŝtato necese formiĝas kiel skuiĝanta anarkio. Tiu anarkio efikas kiel tiu milito de ĉiuj kontraŭ ĉiuj kiu estas kaŭzo de ĉiu diktaturo, de ĉiu forrabo de libero por personoj. Tial estas necese por ĉiu evoluinta homo memori la vortojn de la kristanismo pri unu ŝtato kaj unu registaro, aŭ pri unu grego kaj unu paŝtisto. Kaj same kiel oni devas ami sian proksimulon kiel sin mem, oni devas lerni ami ankaŭ la mondoŝtaton kiel sian propran ŝtaton, kiel sian patrolandon.

### 9. Internaciismo estas en kontakto kun la plej interna kerno de la humanaj mondreligioj, en kontakto kun la mondplano mem

Sen tio ke unuopa homo harmoniigas sian propran konscion kun tiu plej interna kerno de la mondreligioj, tute maleblas por la mondoŝtato kreiĝi konforme al tiu dia mondplano. Troa kultado de la nacia ideo, de patrolando, raso aŭ kredo, neeviteble malfruigas kaj prokrastas tiun evoluon kiu elkondukos la tutan homaron el tiu kaoso kiu nuntempe regas inter la nacioj. Agi kune kun tiuj fortoj kiuj akcelas la kreadon de vera internacia mondregno, kaj kiuj ampleksas ĉiujn naciojn kaj havas centran registaron kies unuopaj membroj plene konformas kun la plej interna kerno de ĉiuj grandaj humanaj mondreligioj, tio do signifas esti en harmonio kun la mondplano mem. Tio signifas kunagi laŭ tiuj leĝoj sur kiuj baziĝas ĉia vera feliĉo. Tio signifas esti unuigita kun tiu vero kiun esprimas la

vortoj: “Amu vian Dion super ĉiuj aferoj kaj vian proksimulon kiel vin mem.”

Prelego de Martinus en Martinus-instituo la 30-an novembro 1947. Manuskripto prilaborita de Erik Gerner Larsson kaj aprobita de Martinus. Tradukia el dana en Esperanton de Ib Schleicher en 1996. La traduko estis reviziita de Hokan Lundberg en 2017. Artikolo n-ro: M1750.



Carl Bloch

*Dana pentristo Carl Bloch (1834-1890) – Jesuo en Getsemano*



# Pri la titolo "La Tria Testamento"

de Ole Therkelsen

**1. En 1951 Martinus unuafoje skribas pri "tria kaj lasta testamento"**
Martinus rakontas ke la nova titolo *La Tria Testamento* estas io kio grade maturiĝis en lia konscio, kiel ankaŭ evidentiĝu el la jena historia klarigo.

La unua fojo kiam Martinus buŝe priparolis trian testamenton, estas nekonata, sed la unua fojo en la literaturo estas en *Livets Bog* 5, kie la titolo de par. 1849 estas: *"La Spirita Scienco kiel tria kaj lasta testamento"*.

En 1947 Martinus komencis la eldonadon de LB5 dissendigante la unuajn 16 paĝojn kun *Kosmos* kaj la leteroj al la abonantoj de *Livets Bog*. Tial estas komence de la volumo indikite ke la eldonjaro de LB5 estas 1947. Sed la lastaj 16 paĝoj de LB5 estis skribitaj, presitaj kaj dissenditaj al la abonantoj nur en 1952. Supozante proksimume konstantan rapidecon de la skribado kaj iom interpolante, mi elkalkulis ke Martinus kredeble publikigis par. 1849 en la jaro 1951.

Martinus tie asertas ke la Mosea leĝo pli multe stimulis la familian amon kaj la principon de reproduktiĝo ol la amon al la proksimulo. Pro la humana evoluo de la homoj la Malnova Testamento do ne estis adekvata en la longa daŭro kaj tial estis kompletigenda per la Nova Testamento. Sed pro la plua intelekta evoluo de la homoj, al multaj el ili dogmoj aŭ kredartikoloj ne plu estas adekvataj, kaj tial oni bezonas sciencan eksplikon de la Nova Testamento.

Martinus: "Ĉu ne ĝuste tiu bezono nun estigas spiritan sciencon kaj tial *trian kaj lastan testamenton?* – Post tiu testamento neniu homo plu bezonos la konsiladon de aliaj. Ĉi tie oni povas esti kondukita tute ĝis sia propra granda inico aŭ spirita naskiĝo, post kio oni mem estos levita en harmonion kun la Patro kaj la mondbildo, kaj tiamaniere mem estos la vojo, la vero kaj la vivo." (LB5, par. 1849).

**2. En 1953 La Tria Testamento estas priparolita kiel "evolu-fazo"**
La unua fojo kiam Martinus uzas rekte la esprimon *La Tria Testamento,* estas en la prelego *Paganismo kaj kristanismo* en Klint la 13-an de julio 1953, kies teksto estis publikigita unuafoje en kontaktletero n-ro 12/1958. Ĉi tie Martinus ne priparolas *La Trian Testamenton* kiel titolon de sia verko, sed kiel la lastan el tri evolu-fazoj.

Martinus: "La evoluo de la kristanismo estas dividebla en tri fazojn, tiun kiu reprezentiĝas en la Malnova Testamento, tiun kiu reprezentiĝas en la Nova Testamento, kaj fine tiun kiu reprezentiĝos per la evoluado de la spirita scienco, kiun ni povas nomi *La Tria Testamento."* (*Kosmos* n-roj 4/1987 kaj 11/2002).

La kristanismo estis anoncita jam en la vortoj de Dio al Abrahamo: "Beniĝos per via idaro ĉiuj popoloj de la tero". – La profetoj rakontis ke naskiĝos reĝo en la familio de David, Mesio kiu alportos savon kaj benon al ĉi tiu mondo. Sed kvankam la kristanismo ĝermis el la judismo, la malnovtestamentaj vortoj pri redonado "okulon por okulo, dento por dento" ne estas esprimo de kristanismo, kiu baziĝas ĝuste sur la malo – pardonado.

La kerno de la tria evolu-fazo estas la spirita scienco, kiu kondukos la kristanismon al ĝia perfektiĝo en formo intelektigita kaj sciencigita.

### 3. En 1955 La Tria Testamento – monda epoko

En la prelego *La monda epoko de la kristanismo* la 2-an de oktobro 1955 Martinus priparolas *La Trian Testamenton* kiel parton de la monda epoko de la kristanismo, kiel stadion en la evoluo aŭ parton de la homkreado fare de Dio laŭ lia bildo.

Martinus: "Tiel ni vidas ke la lasta stadio de la kristana mondepoko, la nova monda kulturo, jam estas enkonstruita en la antaŭaj kulturoj. La monda epoko de la kristanismo konsistas el tri grandaj stadioj, el kiuj la unua konsistas el la Malnova Testamento kaj la judismo kaj la dua el la Nova Testamento kaj la kristanismo, dum kiuj la materia stato estis evoluigota. La tria stadio estas *La Tria Testamento* aŭ la spirita scienco, kiu fundamentos la pluan evoluon de la homo kaj garantios ke la homoj ene de tiu epoko harmoniiĝos kun Dio." (*Kosmos* n-ro 11/1991 kaj 3/2007).

En la prelego Martinus akcentis ke fariĝu scienco ke la kondutmaniero de Kristo estas la modelo de la perfekta homo en la bildo de Dio. La analizaroj de la spirita scienco, sekveblaj de ordinara inteligento, ĉiukampe montriĝas kiel scienca vero, ke oni estu ĝojo kaj beno al ĉio viva, kaj ke ami Dion super ĉio kaj sian proksimulon kiel sin mem estas la plenumiĝo de ĉiuj leĝoj. La tasko de la spirita scienco estas disvastigi tiun veron kaj pravigi kaj sciencigi ĉiujn eldirojn de Kristo. La spirita scienco ne estas spirita scienco, se ĝi ne ĉiupunkte povas konfirmi la Jesuan Predikon sur la Monto.

En *Livets Bog* Martinus argumentas ke lia mondbildo ne estas bazita sur la Biblio. La eterna mondbildo ekestis ekskluzive per rekta vido de Martinus mem, per lia propra sensado de la vivo mem, kaj ĝi tial neniamaniere estas ia plagiato aŭ imito de iu ajn alia libro. Konfrontante la kosmajn analizojn al la eldiroj de Jesuo, Martinus per tio ne celas subteni la spiritan sciencon, ĉar ĝi mem baziĝas sur la leĝoj de la logiko. Estas inverse, nome ke Martinus per logiko kaj spirita scienco volas pravigi la eldirojn de Jesuo. Per Biblia esprimo oni povas diri ke Martinus "gloras" Jesuon. (LB3 par. 926).

### 4. Paŭzo de la termino La Tria Testamento dum dek tri jaroj ĝis 1968

Komence de la 1950'aj jaroj Martinus plurfoje uzis la esprimon *La Tria Testamento* en la senco de evolu-fazo aŭ epoko. Post tio sekvas paŭzo de pli ol dek tri jaroj, dum kiu li ĝin uzas nek en prelegoj, en artikoloj, nek en libroj – eble ĉar la esprimo la Kosmologio de Martinus ĝuste dum tiuj jaroj disvastiĝas kaj fariĝas la plej uzata.

Necesas atendi ĝis 1968 en Varnhem, Svedio, kie Martinus en prelego denove uzas la esprimon *La Tria Testamento,* sed ĉi-foje je la unua fojo kun rekta referenco al la titolo de la verko, pri kiu li diras ke li pluevoluigos ĝin tiel ke ĝi estos *La Tria Testamento*. (Mia rilato al Dio, prelego 1968.06.02).

En 1969 Martinus plurfoje uzis la esprimon *La Tria Testamento*. El tiamaj programoj krome evidentiĝas ke Martinus eĉ faris prelegojn titolitajn *La Tria Testamento,* jen en la Instituto la 10-an de februaro 1969, jen en Jönköping la 13-an de majo 1969. Tie li denove uzis *La Trian Testamenton* kiel indikon de monda epoko.

En la du ĉi-subaj citaĵoj el la Kristnaskaj salutoj de Martinus en 1969 kaj 1970 li uzas la respektivajn esprimojn *"la tria kaj lasta testamento de la vivo"* kaj *"en nova monda epoko, en tria testamento"*.

Martinus: "Per la nova kosma monda impulso, *per la tria kaj lasta testamento*

*de la vivo,* mi vidas la betleĥeman stelon kiel sunon leviĝi super la teron. Kaj antaŭ ĉi majesta radiado de la Dia spirito mi vidas la nigrajn mortosferojn de la milito forvelki el la tero, samkiel la nebuloj de la nokto forvelkas antaŭ la leviĝanta matena suno. Post tio mi vidas ke la Kristnaska mesaĝo 'paco sur la tero' sparkas en ĉiuj okuloj, karesas per ĉiuj manoj kaj benas per ĉiuj idiomoj. Kaj nia mondeto daŭrigas sian orbiton en la spaco kiel insulo de beateco inter la astroj." (Kristnaska saluto 1969).

Martinus: "Kaj la komenciĝanta humaneco kaj amo al la proksimulo de nova monda kulturo komencas montri siajn naskodolorojn per la granda disfalo, degenero kaj dissolvo de la malnova kulturo. Kaj *en nova monda epoko, en "tria testamento",* en kiu dissolviĝos la superstiĉoj kaj eraroj de paganismo kaj kristanismo en la du malnovaj testamentoj, ĝi forsvenos el la menso kaj koro de la homoj samkiel la malvarmaĉaj nebuloj de la nokto forsvenas antaŭ la radiado, lumo kaj varmo de la leviĝanta matena suno." (Kristnaska saluto 1970).

**5. En 1971 La Tria Testamento uziĝas kiel nomo de libro**

80-jariĝante en 1970, Martinus ĉesis fari prelegvojaĝojn kaj nun uzis ĉiujn siajn fortojn por verki. En 1969 Martinus faris siajn lastajn prelegvojaĝojn al Svedio kaj la provincoj de Danio, kaj lia sesa prelegvojaĝo al Islando en 1970 fariĝis lia fina kaj lasta prelegvojaĝo. Kvankam estis planite, Martinus neniam iris al Norvegio por prelegi.

Dum la lastaj dek jaroj de sia vivo Martinus kutime faris nur du prelegojn jare, nome okaze de la enkonduko de la somera sezono en la Martinus-Centro de Klint kaj la 11-an de aŭgusto je lia naskiĝtago, kiun oni kutime festis en ĉambroj de la Inĝeniera asocio aŭ en hotelo Sheraton en Kopenhago. Mi mem aŭdis ĉiujn tiujn prelegojn, kaj ĉe lia 81-jariĝo en 1971 estis precipe interese aŭdi pri liaj novaj planoj, kiuj estis ŝanĝitaj de post marto 1971.

Inter marto kaj aŭgusto 1971 Martinus ricevis fortan impulson koncerne *La Trian Testamenton.* Nome, je la 50-jariĝa tago de la Afero li diris ke li nun finverkas LEM4, supozante ke li finos ĝin somere. Tiam restis du simbollibroj, LEM5 kaj LEM6, kiujn li esperis finverki en 3-4 jaroj. (La 24-an de marto 1971).

Sed nelonge poste Martinus ŝanĝis tiujn planojn, ĉar li ricevis intuician impulson ke li ekverku libron kiu al la publiko prezentos lian verkon kiel *La Trian Testamenton.* Li sekve flankenlasis la laboron pri la simboloj, revenonte al ĝi post la finverkado de la prezenta libro *La Tria Testamento.*

Martinus: "Mi ja jam preskaŭ finis la kvaran parton de la simbollibro [LEM4]. Sed tiam mi ricevis pli altan impulson, ke mi laŭeble plej rapide faru alian libron, malgrandan libron en kiu la tuta mondbildo troviĝos en koncentraĵo. Nun venis la tempo, kiam ni estas devigitaj ekkoni kaj konigi tion kio okazas ĉi tie en Skandinavio. Kaj tio estas 'La Tria Testamento'. Ĝi estas tio kion Jesuo ne povis diri al siaj disĉiploj, sed kiel li diris, la veron 'la parakleton la sanktan spiriton' sendos la Patro, kaj ĝi instruos al la homoj ĉion el tio kion ili tiam ne komprenis." (Johano 16.12-13). (Prelego 11-a de aŭgusto 1971).

Martinus antaŭ tio observis ke ekestis speciala matureco por la kosmaj analizoj ĉe la gejunuloj. Li ofte menciis ke ili havas "modernan konscion", kaj ke ili estas "la komenco de nova monda kulturo". Por tiuj gejunuloj Martinus deziris laŭeble plej rapide skribi ion mallongan pri la analizoj, kaj tiam ili eventuale poste povos legi la grandajn verkojn.

Dum la lastaj dek jaroj de sia vivo Martinus estis tre okupita pri *La Tria Testamento.* Li parolis pri ĝi en preskaŭ


ĉiuj siaj sezonkomencaj prelegoj en Klint kaj en naskiĝtagaj paroladoj en Kopenhago. Multfoje li parolis pri ĝi en kunsidoj en la Instituto, al la kunlaborantoj kaj al amikoj private. Li multe primeditis kiel plej bone prezenti al la granda publiko *La Trian Testamenton* en libra formo.


Tage Buch skribas: "Eldonisto Jarl Borgen, aŭdinte pri la ideo de Martinus eldonigi libron kun la titolo 'La Tria Testamento' – tio estis la provizora labortitolo de la planata enkonduka libro – ofertis en novembro 1971 en letero al Martinus eldoni tiun libron. […] Martinus ne sukcesis eldoni la planitan libron, nek la 4-an volumon de la simbollibro, sed tiuj materialoj ekzistas en manuskripto, kaj iom post iom ili estos eldonitaj, post provlegado. Parto tamen estas prilaborenda, ĉar ĝi troviĝas nur en la unua surpaperigo." (Memoroj de Martinus paĝo 152, *Kosmos* n-ro 5/2015).

**6. En 1975 La Tria Testamento fariĝas nomo de la tuta verko de Martinus**

Ĝis 1975 Martinus ĉiam priparolis sian prezentlibron kiel *La Trian Testamenton,* sed poste li komencis uzi la titolon La Tria Testamento ankaŭ kiel nomon de sia tuta verko. Tio montriĝas en du prelegoj kiujn Martinus faris somere de 1975. (*Kosmos* n-roj 7/2004 kaj 7/2005). Samjare Martinus ankaŭ skribis leteron tiurilate al Helmer Fogedgaard (1907-2002) koncerne la uzon de la titolo *La Tria Testamento.*

Martinus skribis: "Post sanrilate bona 'ĝenerala revizio' de mia organismo mi ekfartis tre bone kaj forte laboras pri la libro 'La Tria Testamento', tre atendata de multaj homoj. Sed ĉi tie mi devas sciigi ke la dirita Testamento ne estas nur libreto de eventuale cent paĝoj. Ĝi estas nenio malpli ol la sumo de ĉiuj miaj jam manifestitaj libroj, skribaĵoj, simboloj kaj revuoj. Sed estas vere ke mi





*Gaja Martinus montras sian projekton de kovrilo por la prezenta libro La Tria Testamento (Det Tredje Testamente)*
*La libro estis aldonita en 1981. La foto estas farita la 13-an de aŭgusto 1978 en Vanløse Allé 26, de kie mi rekonas la seĝon kaj la malhelan floran tapeton, ĉar mi mem poste loĝis en la loĝejo dum iom malpli ol jaro. Fotis Inge Sørensen.*

nun verkadas libron kiu montros ke mia kosma mondbildo ampleksas tiun 'multon' kiun Kristo povus esti dirinta al siaj disĉiploj, sed kiun ili siatempe 'ne povis elporti'. Kaj tial ĝi devis esti prokrastita al posta tempo. (Johano 16.12-15).

Mia nova libro do montros 'la Revenon de Kristo' aŭ pli ĝuste 'la Revenon de la Kristanismo'. Kristo ne venos en persona fizika enkarniĝo kiel predikanto kaj miraklofaristo. Li forte avertis al la homoj kontraŭ tia kredo. Li male venos 'en la nuboj de la ĉielo kun potenco kaj granda gloro'. (Mateo 24.30).

Kia do ‘potenco kaj granda gloro’ estas tio? –

Jes! Kara Helmer Fogedgaard, ja ĝuste tio estas la fokuso en ‘La Tria Testamento’ kaj la suspenso de mia nova libro. La libro ne estas preta kaj la temo ankoraŭ ne liberigita. Mi tial ne povas riveli pli multe al vi hodiaŭ. Kun tio tre amike salutas vin *Martinus."* (*Kosmos* n-ro 9-10/2004).

**7. Martinus ne provis protekti la titolon La Tria Testamento**

Martinus opiniis ke li ne bezonas protekti sian titolon *La Tria Testamento.* Laŭ li ne gravas ke aliaj uzos la saman titolon, ĉar pli aŭ malpli frue oni ja vidos, kiu estas la ĝusta.

Se oni rete serĉas per Google, oni jam nun vidas ke troviĝas multaj lokoj kie homoj nomas siajn skribaĵojn *Det Tredje Testamente, The Third Testament, Das Dritte Testament* ktp.

**8. Livets Bog 1 sub la titolo La Tria Testamento**

Antaŭe la libroj de Martinus inkluzive *Livets Bog (La Libron de la Vivo)* estis eldonataj nur de malgranda privata eldonejo, sed nelonge antaŭ lia forpaso fariĝis al Martinus nepraĵo eldonigi *La Trian Testamenton* per granda publika eldonejo. Kelkajn jarojn post la forpaso de Martinus, Jarl Borgen rakontis en naskiĝtaga parolado antaŭ granda kunveno de Martinus-interesitoj en hotelo Sheraton, ke altiris lian atenton ke Martinus volis fari unuvoluman prezentlibron, ĉar kiel eldonisto li sciis ke tre malfacile estas vendigi grandajn plurvolumajn verkojn.

Lige al libroeldonado Martinus ofte diris: "Estu la eldonejoj kiuj venu al ni". Martinus ne volis forci la aferon anticipante la planon de la Providenco. Li estis konvinkita ke la Providenco certe donos signon aŭ sendos la ĝustan homon kiam la tempo estos preta. Ĉar Jarl Borgen mem estis alturninta sin, Martinus opiniis ke la Providenco per tio indikis Borgen kiel la ĝustan eldoniston.

Sed ĉar Martinus ne sukcesis tute fini la libron *La Tria Testamento,* necesis ke pasu ne malpli ol sep jaroj ĝis li rekontaktis Jarl Borgen. Tiel estis, ĉar en marto 1979 Martinus decidis ke li volas reeldonigi la ĉefverkon LB1–LB7 sub la titolo *La Tria Testamento.* El tio rezultis en 1980 pli longaj intertraktadoj kun Jarl Borgen, kiu estante eldonisto sciis ke povos esti malfacile vendi reeldonitan libron, kaj krom tio eĉ sepvoluman. Sed al Martinus estis tiel grave ke la verko aperu per granda publika eldonejo, ke li konsentis doni garantian kapitalon kaj investi monon por la entrepreno.

En la Instituto unu el la kontoristinoj rakontis ke Martinus dum periodo ĉiun antaŭtagmezon venis en la kontoron demandante ĉu estas io nova de Borgen. Tio indikas kiom gravega estis al Martinus tiu libroeldono.

Al granda grupo da junaj kunlaborantoj en Klint dum Pasko 1978 Martinus diris: "Ni estas la komenco de la nova monda kulturo, ni havas tiun scion kiun homoj bezonas havi. Ĝi iam disvastiĝos al la tuta mondo. Ĝi jam videble havas bonajn kreskokondiĉojn, ni ricevas leterojn el preskaŭ la tuta mondo, kvankam la libroj ankoraŭ ne aperis per la grandaj eldonejoj. Miaj analizoj kaj miaj libroj nome ne estos liberigitaj de la Providenco ĝis *"La Tria Testamento" estos aperinta per la grandaj eldonejoj.* Tiam estos multe da agitiĝo pro ĝi, tiam ĝi havos siajn benon kaj malbenon. Sed ni ne bezonas timi la malbenon, ĉar ni mem neniun malbenas, do ni ne estos tuŝeblaj tiamaniere." (*Kosmos* n-roj 3/2004, 7/2008 kaj 7/2009).

La teksto venas el la libro "Martinus kaj la nova monda moralo" verkita de Ole Therkelsen. La libro ekzistas en Esperanto. Tradukis la tekston el la dana Jens Stengaard Larsen.

# Mondliberiganto

Demando: En la analizoj de Martinus, Jesuo ofte estas nomata *liberiganto*. Ĉu eblas ricevi klarigon pri la signifo de tiu vorto? – Ankaŭ la eklezio ja uzas la vorton, sed kun la signifo, ke Jesuo liberigis nin kaj elpagis niajn pekojn.

Respondo de Martinus:
Ĝustas, ke mi en miaj analizoj karakterizas Jesuo-Kriston kiel mondliberiganton. Kiam mi perceptas lin tiel, tio ne estas pro la sama kialo, surbaze de kiu la religiaj aŭ preĝejaj aŭtoritatoj perceptas lin kiel elaĉetanton aŭ liberiganton. Ili kredas kiel konate, ke Kristo venis al la mondo nur por esti krucumita aŭ punita pro la pekoj, kiujn ne li, sed la homoj faris. La samaj aŭtoritatoj sekve kredas, ke ĉiu unuopa homo pro tiu ĉi krucumado povas esti liberigita de la puno pro la pekoj aŭ la malbono, kiujn ĝi faris al siaj kunvivantoj kaj sekve eniri la ĉielan regnon. La ĉiela regno pro tio fariĝas zono aŭ hejmloko de estuloj, kiuj ĉiuj estas fuĝintaj de sia respondeco lasinte nekulpan estulon suferi pro la malbono, kiun ili mem faris, kaj pro kiu ili devus mem preni sian punon. La ĉiela regno neeble povas esti bonfarto, feliĉo kaj grandiozo, kiujn oni alproprigis per torturo, krucumo kaj morto de senkulpa estulo. La ĉiela regno ne povas esti bono, kiu povas esti akirigita per tia kruda leĝo kaj nemorala metodo, tiel ke ĝi analogas kun la metodoj, kiujn oni en la jura sistemo taksas krimo kaj punas per mortpuno. Kaj Dio ne povas esti tiom malalta kaj malbonega reprezentanto de justo kaj krome tiel sangosoifa, ke li por entute pardoni al la estuloj iliajn pekojn, kun kiuj li cetere mem kreis ilin, postulas vidi krucumon, suferadon kaj morton de nekulpa estulo. Ĉu ĉi tie ne facilas vidi, kial la kristanismo senhomiĝas kaj la homoj fariĝas dubantoj, fariĝas sendiaj, fariĝas materiistoj, grade laŭ la alkresko de la intelekteco. Estas ĉi tie, ke la mondliberigado en la dudeka jarcento estas interveninta kaj malligos aŭ liberigos la homojn de la nun tiel malreligiemiga religia mondbildo kaj la el tiu ĉi sekvanta sendia, materiisma mondbildo kaj per tio kondukos la homaron al la sola natura ekvilibro inter ĝia fizika kaj psika kono. Estas tiu ĉi ekvilibro, kiu estas la sola vojo al iniciĝo, al kosma konscio, spirita liberiĝo aŭ suvereneco kaj la pro tiu ĉi sekvanta mensa kunligiĝo kun Dio aŭ la mondkonscio, kio faras la estulon unu kun la Patro. Kaj per la spirita scienco, tiu ĉi ekvilibro kaj sekve la mondliberigado kondukos la homaron el la zono de la malamo, la militoj kaj la suferoj al la sunluma estado de absoluta paco, al la ĉiela regno, kies ekziston ebligas absoluta amo al la proksimulo kaj ne postulo je senpoveco de aliaj homoj pro torturo, krucumado, primokado, suferado kaj morto pro pekoj, kiujn ili neniam faris.

La homaro nun en la dudeka jarcento eniris en mensan krizon, kiu minacas je plena kulturpereo, pro tio ke la homoj per la forto de ilia supergranda fizika kapablo, sed preskaŭ tute sen psika kapablo, ne mem povas trovi aliajn rimedojn aŭ vojojn al savado ol supergrandaj, vivestingaj kulturdetruiloj. Ili pro tio faras la kreadon de mortigiloj,

kaj tiel pli kaj pli grandan kapaciton de kulturdetruado, la plej alta idealo. Ili ne komprenas, ke ili per tio falas pli kaj pli malsupren en suferadon kaj pereon. Militoj ne povas savi la mondon. Ne estas mortigiloj, kiujn la homoj bezonas, sed ŝanĝon de temperamento. Sen tiu ĉi ŝanĝo la terglobo ene de ne tre multaj jaroj fariĝus tute netaŭga por homa kulturo kaj vivado. Sed danke al la principo de mondliberigado, la sama amoprincipo, kiu kaŭzas, ke la gepatroj protektas sian idaron ĝis ĝi atingas plenaĝon, ankaŭ kaŭzas, ke la homaro ricevas certan protektadon, ĝis kiam ĝi atingos spiritan plenaĝon. Per tiu ĉi principo la homaro estos gvidata al liberigo de tiu ĉi de ili mem kreata infero kaj ties diabla mortfilozofio, same kiel ĝi en ĉiuj siaj antaŭaj mensaj krizoj historie estis liberigita. Ĉi tiuj krizoj ĉiam revenis en tiaj periodoj, kiam la ĝenerala moralkoncepto aŭ diokompreno estas finspertita aŭ malnoviĝinta, rilate al la intelekta evoluo de la estuloj. La gvidaj kulturkonceptoj povis laŭgrade nur esti spertataj kiel naivaj. La estuloj fariĝis pli aŭ malpli senmoralaj. Krom tio ili ne havis aliajn rimedojn ol la ĝangala leĝo: “La rajto de la pli forta.”

Ĉiun fojon kiam la religia fundamento ŝanceliĝis, tiu ĉi ĝangala naturo ekhavis reviviĝon aŭ ekfloradon. Sed kiam la mizero de la homoj estis plej granda, tiam la helpo estis plej proksima. La mondliberigado nehaltigeble intervenis. Kaj ĉiam naskiĝis estulo kun ĝuste ekzakte la psika kapablo kaj scio, kiuj estis bezonataj por renovigi la spiritan fundamenton de la krizantaj homoj tiel multe, ke ili povis eleskapi parton el la ĝangala ĉirkaŭpreno kaj esti gvidataj en ĉi tiun novan kulturgrandiĝon. La estulo, kiu sekve naskiĝis, kompreneble estis estulo, kiu estis antaŭ la terhomoj en la longa evolu-vojaĝo de la spiralciklo kaj pro tio antaŭlonge fariĝis supera al ili en tiuj kampoj, en kiuj ili ankoraŭ estis netalentaj kaj senhelpaj. Estas tiaj estuloj, kiujn ni konas de la historio de la homaro kiel “mondliberigantoj”. Estas tiuj estuloj, kiuj origine estis reĝoj, ĉefpastroj kaj profetoj. Ili liberigis la homojn de la malnoviĝintaj dogmoj kaj tradicioj donante al ili novajn kaj pli laŭtempajn. Por la popoloj de la Okcidento, Kristo fariĝis siatempe la plej granda mondliberiganto. Per li manifestiĝis tiom granda spirita gvidlinio, ke ĝi neniam ajn povos esti superatutita. Per ĝi ĉiuj popoloj de la tero beniĝos. Kaj estas tiu plenumiĝo, kiu okazas per la mondliberigado de la dudeka jarcento. Kaj per tio la mondliberiga misio sur la tero estos kompleta. Per tiu ĉi plej lasta granda ellaso de tiu ĉi dia principo ĉiu unuopa tera homo grade mem atingos la iniciĝon, kiu estas la plenaĝiĝo pri spirita matureco. Tiam la estulo mem fariĝis la vojo, la vero kaj la vivo. Kaj kie ĝi povas lumi per sia propra lumo, ĉiuj aliaj lumfontoj estas superfluaj.

Tradukis el la dana Hokan Lundberg kaj Henning Sato von Rosen.



# NOTOJ


## Eo-semajnoj en Martinus-Centro en 2018

Inter la 28-a de julio kaj 11-a de aŭgusto 2018 la Esperanto-semajnoj en Klint okazos paralele kun dana, sveda, angla kaj germana kursoj en internacia etoso. Estos prelegoj, studrondoj, konversaciaj rondoj, kaj en la vespero estos distra programo, teo kaj kukoj en la restoracio Terrassen. Pli da informoj ĉe esperanto@martinus.dk



## Senpaga esperanto-Kosmos

1. Du fojojn jare vi libere povos elŝuti la ret-version de *Kosmos* en Esperanto ĉe la reta adreso de Martinus-Instituto: www.martinus.dk
2. Retpoŝte vi ankaŭ senpage povos aboni elektronikan version de Eo-Kosmos, se vi sendos vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk




INFORMO PRI
LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento. La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 3838 0100
Telefontempo: lundo-ĵaŭdo 9-12
DK p.ĝiro 642-9580
www.martinus.dk
esperanto@martinus.dk
shop.martinus.dk

Redakcio: Hokan Lundberg
kaj Ole Therkelsen.
Kompostado: Jan Tarbensen.
La frontpaĝa bildo: Skulptaĵo de Bertel Thorvaldsen (1770-1844)

Unuopa kajero: DKK 40,00

Kopirajto: © Martinus Institut
Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
Presita de Martinus Institut
ISSN 1600 4116.

# LIBROJ EN ESPERANTO

La libroj en la verkaro **La Tria Testamento** de Martinus estas tradukitaj en la albana, angla, ĉeĥa, ĉina, franca, germana, hispana, hungara, islanda, itala, japana, kroata, litova, nederlanda, pola, portugala, rumana, rusa, serba, sveda lingvo kaj Esperanto. –

**Livets Bog 1**

**La Eterna Mondbildo 1-4.** – Libroj kiuj klarigas la simbolojn de Martinus

**Logiko**

**Sepulto**

La libretoj:

1. **La sorto de la homaro** – Pri la principoj laŭ kiuj evoluas la homaro.
2. **Pasko** – La mondhistoria pasko-evento estas analizita tiel, ke ĝi klare reliefiĝas.
3. **Kio estas la vero?** – Kun tiu fama demando kiel elirpunkto la libro montras, ke estas grave kompreni la veron de la vivo kaj akiri realan scion pri ĝi.
4. **Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio** – Tio kio instigis Martinus verki kaj la praktikaj sekvoj.
5. **La ideala nutraĵo** – La homa nutromaniero evoluas en direkto al malpli da mortigado kaj pli da humaneco.
6. **Folioj el la bildolibro de Dio** – Poezia verko, en kiu i.a. amplena priskribo de tansiro inter tago kaj nokto bele ilustras la idealan manieron de renkontiĝo inter du homoj.
7. **La idolo plej longe vivanta** – Ĝia temo estas la limigita vivkoncepto de la nuntempa homaro, kaj la grandiozo de la ĉirkaŭa naturo. La idolo plej longe vivanta estas la homo mem.
8. **La homaro kaj la mondbildo** – Traktas la homan vivon laŭ novaj vidpunktoj kaj ĵetas lumon sur malnovajn kaj novajn problemojn.
9. **Inter du mondepokoj** – Traktado de tiu tansira situacio inter primitiveco kaj humanisma vivoformo, en kiu vivas la nuntempa homaro.
10. **Kosma konscio** – Mensa suvereneco.
11. **La mistero de la preĝo** Klariĝas la preĝon Patro Nia kaj kiel preĝado povas esti scienco.
12. **La vojo al iniciĝo** – Ĉirkaŭ miaj kosmaj analizoj. – Donacokulturo.
13. **La kristnaska evangelio** Pri Jesuo kaj la evoluo de la homarao.